

# Sekso kaj Egaleco

Numero 0

Oktobro 1979

1,50 gld. aŭ

2 int. resp. kup.

Multaj homoj partoprenis la diskuton pri la plano eldoni novaĵleteron pri virina agado. Pluraj tuj vidis bezonon por tia bulteno kaj forte subtenis ĝin per la plej praktika maniero - per kontribuado. Aliaj tamen kritikis la ideon, asertante, ke la virinoj ne bezonas apartan eldonaĵon. Ili argumentis ke la virinoj ne devus konsideri sin speciala grupo, sed agi en la kadro de la ordinara socio, senzorge pri sia sekso. Tiu reago venis precipe de virinoj, kiuj mem sukcesis tion fari.

Bedaŭrinde, por la plimulto da virinoj la afero ne estas tiel facila. Sen-dube, ili havas la saman potencialon kiel viroj - sed praktikaj kaj psikologiaj malhelpoj neniam permesas al ili realigi tiun potencialon. Ĉi tiu novaĵletero celos esplori kaj identigi tiujn faktorojn, kiuj influas la situacion de virinoj, kaj diskuti manierojn superi ilin - kaj ĉu entute necesas superi ilin.

Ĉu do SKE estas nur por virinoj? Kompreneble, kiel la plej evidentaj viktimoj de seksa diskriminacio, ili pli ol viroj okupiĝas pri la temo. Tamen, la ekzisto de iu ajn formo de diskriminacio - sed precipe de speco, en kiu ni ĉiuj regule kaj rekte implikiĝas - devus esti temo grava por homoj de ambaŭ seksoj. Efektive, iu ajn agado rilate al la socia pozicio de virinoj nepre koncernos ankaŭ virojn kaj finfine bezonos ilian apogon. Ju pli virinoj konsciiĝas pri sia situacio kaj provas ŝanĝi ĝin, des pli ili malproksimiĝos de tiuj viroj, kiuj rifuzas kompreni ilian sintenon. Tio jam okazis en la pli batalemaĵaj virinaj organizaĵoj. Mi esperas do, ke viroj same aktive kiel virinoj partoprenos la diskuton pri seksa egaleco per ĉi tiu bulteno. (Cetere, virinoj ne estas la solaj viktimoj de seksa diskriminacio. Ankaŭ la individueco de viroj estas limigita pro antaŭsupozoj pri normoj de vira konduto. Neniu ankoraŭ kontaktis SKE pri tiu temo. Certe, estus interese ricevi opiniojn pri ĝi.)

SKE havas la eblecon eniri tute alian teritorion ol la nacilingvaj revuoj pri similaj temoj. Uzante Esperanton, legantoj el la plej diversaj kultu-

roj kaj sociaj niveloj posedas unikan ilon por kompari vidpunktojn kaj informiĝi pri la situacio en aliaj landoj. Por ĉi tiu numero SkE kun plezuro ricevis la artikolon de Manósi DaSGupto (p.13-16) pri la manko de virina movado en Hinda Unio. Sia artikolo levas multajn interesajn demandojn por aktivuloj ekster Azio. Ĉu ni povas akcepti, ke virinoj povus teni egale gravan kaj honoran rangon en iu socio, kvankam laŭ okcidentaj normoj ili ne ĝuas egalrajtecon? Kiam la aparta pozicio de virinoj estas unu el la fundamentaj principoj de difinita kulturo, ĉu estas dezirinde ŝanĝi ilian rolon - kio samtempe implicus kritiki kaj eble detrui tiun kulturon?

Mi estas konvinkita, pro la entuziasma reago al la ideo eldoni ĉi tiun novaĵleteron, ke ekzistas loko en la Esperanto-movado por bulteno pri seksa egaleco. Kuraĝigite de la jama apogo, mi proponas aperigi ĝin kvarfoje jare ekde januaro. Jam venis pli da materialo ol mi sukcesis meti en ĉi tiun numeron, kaj mi esperas uzi almenaŭ parton en la venonta. Ne forgesu tamen, ke por sia plua aperado, SkE dependos de la aktiva subteno de ĝiaj legantoj - ne nur per abonado sed per kontribuadoj en la formo de leteroj, artikoloj, fotoj kaj bildoj. Ĉi celos provizi forumon por la interŝanĝo de vidpunktoj kaj spertoj, kaj bazan materialon por diskutoj. Kelkaj artikoloj inkluzivas demandojn kaj temojn por plia pensado. Do ne nur pasive legu, sed konsideru la enhavon, preparolu ĝin - kaj reagu al ĝi.

Mi dankas miajn kunlaborantojn: precipe Charles Power, kiu helpas per lingva kontrolo kaj la prunto de redakcia adreso (kio verŝajne foje kaŭzis al li neatenditan embarason!), kaj Dermot Quirke, kiu senpage multobligas la novaĵleteron kaj provizas materialojn. Dankon ankaŭ al tiuj, kiuj donacis monon, por ke la novaĵletero povu iri senpage al interesatoj en nepagipovaj landoj. Memoru tiun eblecon, kiam vi pagos vian abonon!

Sed nun, ek al la novaĵletero mem - kaj ne forgesu sendi viajn reagojn!

## SEKSO KAJ EGALCO

Sendependa novaĵletero

La unua numero aperos en januaro 1980.

### Redaktoro

Anna Brennan  
p/a Nieuwe Binnenweg 197B  
3021 GA Rotterdam  
Nederlande

### Kunlaborantoj

Charles Power  
Dermot Quirke

### Jarabono (4 numeroj)

8,00 gld. aŭ 10 irk.

Sendu internaciajn respondkuponojn rekte al Anna Brennan, aŭ pagu al ĝia nederlanda poŝtĉekkonto, n-ro 4112754.

### Perantoj

Brita  
Dermot Quirke  
18 Trouville Road  
London SW4 8QL  
Ĝirkonto n-ro  
12 463 0006

### Norvega

Margrete Landmark  
Buerstad  
N-3135 Torød

Limdato por la venonta numero: 15 dec.

Anna Brennan

# SVISAJ VIRINOJ SALUTAS

Ĉar la 64a Universala Kongreso de Esperanto okazis dum la somera liber-tempo en Svislando, la Asocio de Svisaj Virinaj Organizaĵoj (Bund Schweizerischer Frauenorganisationen/Alliance de sociétés féminines suisses; BSF/ASF) ne kaptis la okazon saluti la virinan agadon de Universala Esperanto-Asocio. Sed inter la membroj de la komitato de BSF/ASF estas esperantistino, kiu partoprenis la Kongreson.

Per tiu ĉi skriba vojo niaj salutoj atingos ankoraŭ pli da esperantistinoj ol nur la kongresanoj. Ni flanke de la BSF/ASF ĝojas pri la iniciato de virinoj eldoni novaĵleteron, el kiu oni povas ekscii, kion faras la diversaj aktivuloj en la tuta mondo.


Tiuj kongresanoj, kiuj aĉetis la insignon, kiu estis vendata sur la stratoj la 1-an de aŭgusto en Lucerno kontribuis - nesciante - monon al kvar svisaj virinaj organizaĵoj; um el ili estas la plej impona, la supre menciita BSF/ASF. Ĝi estas la tegmenta unuigo de 240 virinaj ligoj, virinaj agado-grupoj el ĉiuj partioj, profesiaj ligoj, bonfaraj organizaĵoj ktp; malrekte ĝi atingas pli ol 300 000 virinojn en la tuta lando.

La svisaj virinaj organizaĵoj ĉiam laboras por la plibonigo de la situacio de la virina voĉdonrajto, kiun la virinoj ricevis en 1971. Hodiaŭ ni klopodas por la elekto de kiel eble plej multaj virinoj en la diversajn parlamentojn. Sed ankaŭ la jura situacio kaj la sociaj cirkonstancoj por la virinoj en Svislando estas ne plene kontentigaj. Ni observas tre atente la revizion de la familia leĝaro, kiu devus doni pli da rajtoj al la virinoj. La celo de virina agado en Svislando estas la kunlaboro kaj egaleco inter la geedzoj en ĉiuj rilatoj.

Kompreneble ni ankaŭ flegas la internaciajn rilatojn. BSF/ASF estas membro de la Internacia Konsilantaro de Virinoj, kiu kongresis en Nairobi en aŭgusto 1979. Ĉar tiu konsilantaro ankaŭ havas rilatojn kun UN, la virinoj havus eblecon kontribui ion al la Esperanto-movado per siaj ekzistantaj organizaĵoj.

Tio do estas la ĝenerala stato de la laboroj de la plej granda svisa virina organizaĵo.

Irène Thomann-Baur, Svislando



"La Prezidanto reprezentas la Asocion kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Estraron kaj la Universalajn Kongresojn. Li rajtas delegi alian komitatanon por difinita tasko."

Ĉi tiuj vortoj troviĝas en par. 33 de la projekto pri nova statuto de UEA, kiu aperis pasintjare en la decembra numero de la revuo Esperanto. En la reviziita statut-propono, baldaŭ submetota al la membroj de UEA, tiujn vortojn anstataŭas la jenaj:

"La Prezidanto reprezentas la Asocion en juraj kaj nejuraj aferoj, subskribas la ĉefajn dokumentojn kaj prezidas la Estraron kaj la Universalajn Kongresojn. La Prezidanto rajtas delegi alian komitatanon por difinita tasko."

Krom aliaj ŝanĝoj, la pronomon li en la reviziita versio oni evitas per ripeto de la subjekto aŭ entuta ellaso de la pronomo. Kial tiu ŝanĝo? Ĉiuj scias, ke li foje ricevas pli vastan signifon al tiu de la vortara difino: "Singulara virsekse pron. de la 3a persono" (Plena Ilustrita Vortaro). Ofte oni uzas li ankaŭ por aludi al iu nedifinita homo, kiu povus esti aŭ virsekse aŭ virina.

Tiu kroma senco de li verŝajne fontas el naciaj lingvoj, kiuj simile uzas tiun pronomon en ĝenerala signifo. Tio rezultas nature el situacio, en kiu ĝis lastatempe la kalkulendaj homoj estis kutime nur viroj. Oni simple ne devis normale konsideri eblecon, ke li ne regule kovros ĉiujn gravajn kazojn. Feliĉe, tiu situacio nun ŝanĝiĝas, sed bedaŭrinde postrestas tradicio, kiu sufiĉe koloras la uzon en multaj lingvoj. Pro la ĉiam pli ofta eniro de virinoj en sferojn, kie antaŭe troviĝis nur viroj, nun konstante necesas streĉi la signifon de li por inkluzivi ankaŭ eventualajn ŝi-ojn.

Minimуме, tiu postrestaĵo en nia lingvo estas malaktuala kaj ĝena. Ĉu, maksimume, ĝi povus esti pli ol simple neoportuna? Ĉu lingvo nur spegulas la sintenon de siaj uzantoj - aŭ ĉu ĝi havas la kapablon eĉ aktive influi iliajn opiniojn?

La pronomo li estas ambigua; kutime ĝi rilatas nur al viroj, sed foje ĝi povas aludi ankaŭ al virinoj. Tamen la unua senco estas multe pli ofta kaj tuj evidenta ol la dua. Parolanto eble intencus la duan sencan en difinita frazo; sed ĉu tiu intenco komunikiĝus al aŭskultantoj? Ĉu, praktike, aŭdante la pronomon li, aŭskultanto ne emus ricevi mensan bildon de virsekse estulo?

Eksplicite inkluzivi virinojn en nia konscio, anstataŭ neintence ekskluzivi ilin pro la uzo de ambigua pronomo, povus esti nur pozitiva paŝo. Ĝi aparte gravas en kunteksto, kie oni ankoraŭ ne emas imagi virinon, ekz. kiam temas pri prezidanteco de UEA. Al multaj virinoj la ideo simple ne enirus la kapon, ke ili persone povus pli fari ol stari ĉe la rando de la scenejo kiel spektantoj. La uzo de neambigua pronomo, kiu klare inkluzivus ilin, efektive invitus ilin mem fariĝi roluloj en la agado.

Tamen, ŝanĝi la ĝeneralan lingvouzon ne estas facila tasko; eble pli facile estas ŝanĝi la socion mem. Esperanto, verŝajne, estas pli akceptema de novaj evoluoj ol la naciaj lingvoj. Unue, ĝi estas nova lingvo, kaj do malaktualaj uzoj ne estas apogitaj de longa tradicio. Krome, ĝi estas por la plimulto da parolantoj lernita lingvo (t.e. kiun ili formale studis). Denaskaj parolantoj malfacile povus adaptiĝi al nova pronomo uzo, dum lernanto en Esperanto-kurso tute ne rimarkus problemon.

Kio estas la alternativo al li? Konstante diri "li aŭ ŝi" estas nekonvene, kaj levas novan problemon (kiun pronomon meti unue?) Kelkaj proponitaj solvoj estas diskutitaj en la sekvanta letero de Ole Hagemann. Certe, SkE ofte spertos la bezonon por ĝenerala pronomo, kaj invitas la opiniojn de legantoj pri la plej bona solvo.

ab

### La komunseksa pronomo ri

Parolante pri la komunseksa pronomo, oni devas konscii, ke tiu pronomo estonte fariĝos treege ofta vorto - multe pli ofta ol li kaj ŝi. Kiam oni alktimiĝos al la uzado de la komunseksa pronomo, oni nature uzos ĝin preskaŭ ĉiam, dum li kaj ŝi estos uzataj nur en tiuj kazoj, kie gravas la sekso de la priparolata persono. Pro tiu ofteco estas esenca la mallongeco de la komunseksa pronomo. Ĝi prefere konsistu el nur unu konsonanto + i.

Tiun postulon kontentigas la jenaj 3 eblecoj:

1. Enkonduko de nova pronomo hi kun la signifo de li, kaj uzado de li kiel komunseksa pronomo.
2. Ĝeneraligo de la signifo de ŝi.
3. Uzado de la nova pronomo ri.

La unua solvo havas la malavantaĝon, ke ĝi necesigas ŝanĝon de la signifo de la jam ekzistanta pronomo li.

La dua ebleco estas tute logika solvo. La pronomo ŝi jam laŭdifine povas montri aĵon aŭ estulon. Mi tamen forte malrekomendas uzi ĝin por personoj, ĉar valoras daŭre konservi la distingon inter aĵoj kaj personoj. Zamenhof kreis la lingvon tia, ke la pluralo havas unu formon, ili, dum la pli multe uzata singularo havas diversajn formojn, li, ŝi kaj ĝi. Tio donas al la lingvo valorajn nuancojn, kiuj helpas al la senpera kaj klara kompreno. Se oni rompos tiun tradicion de distingo inter aĵoj kaj personoj, oni malriĉigos la lingvon kaj kontribuos al konfuziĝo kaj miskompreno ĉe la ĉiutaga uzado de la lingvo.

La tria ebleco estas la perfekta solvo. La komunseksa pronomo ri montras nur personon kaj per tio plene vivtenos la utilan distingon inter personoj kaj aĵoj. Oni kompreneble devas alkutimiĝi al tiu nova pronomo, sed post alkutimiĝo ĉiuj uzos la pronomon ri precize same facile kaj nature kiel nun ŝi kaj li.

Ole Hagemann, Danlando

## KVA

estas mallongigo de Komisiono pri Virina Agado de UEA. Pri la laboro de tiu komisiono vi verŝajne sufiĉe ofte legos en venontaj numeroj de ĉi tiu novaĵletero. Ĝi estis fondita por kunordigi la Esperanto-agadon por la Internacia Jaro de la Virino (1975), sub la gvido de Elsbeth Bormann. Dum tiu jaro okazis grandskala laboro, ekz. kontaktoj kun naciaj virinaj organizaĵoj, pritrakto de virinaj demandoj en Esperanto-kongresoj kaj kunvenoj, ktp. Tamen, laboro en tiu kampo ne finiĝis post la Virina Jaro. La Komitato de UEA rekonis la daŭran bezonon por la komisiono, kaj decidis, ke ĝi fariĝu konstanta.

La laboro de KVA en la lastaj jaroj centriĝis ĉefe ĉirkaŭ la Universalaj Kongresoj. Ĝi aranĝis renkontiĝojn kun lokaj virinaj asocioj en la kongres-urboj, diskutgrupojn kaj prelegojn. En Lucerno, bedaŭrinde, la gvidantoj de la loka virina asocio estis en libertempo dum la kongresa semajno, kaj ne estis eble aranĝi renkontiĝon. La programo do konsistis el prelegoj, publika kunveno, kaj kunsidoj de la komisiono. 4 el la 5 komisionanoj ĉeestis la Kongreson; ili estis J. Tonkin (Usono), B. Beleva (Bulgario), Y. Isobe (Japanujo) kaj E. Kehlet (Belgujo). Ne povis veni la kvina membro, Ĵ. Sadigi (Irano).

Dum la unua kunsido, kiu estis publika, fariĝis evidente, ke kelkaj virinoj komencis dubi la entutan neceson por virina komisiono. Ili argumentis, ke la ekzisto de aparta komisiono implicas, ke la virinoj bezonas specialan traktadon kaj ne kapablas eniri la normalan laboron de la Esperanto-movado. Kontraŭ tio estis dirite, ke al multaj virinoj mankas la memfido kaj eduko necesaj por memstara agado; tial ili bezonas apartan helpon. Rezultis tre vigla diskuto, tamen sen klara konkludo. Estis evidente, ke ekzistas sufiĉe forta diferenco de opinio pri tiu demando, kaj ke necesas redifini la celojn de la komisiono. Tiu temo estis denove pritraktita en la publika kunveno (kie ankaŭ estis prezentita la plano eldoni ĉi tiun novaĵleteron). La diskuto komenciĝis iom malvigle ĝis la partoprenantoj formis malgrandajn grupojn, kie ili povis senĝene paroli. Rezultis kelkaj praktikaj sugestoj por estonta agado de KVA.

Ĉiuj membroj de KVA estis tro ŝarĝitaj pro aliaj taskoj. En Lucerno ili retiriĝis por permesi la elekton de novaj membroj. Tiuj estas: Anna Brennan kaj Loes Demmendaal (Nederlando) kaj Flóra Szabó-Felső (Hungarujo). Ĉar du el la tri novaj komisionanoj loĝas en la sama urbo, ili espereble povos pli facile kunordigi sian agadon ol la kvin antaŭaj membroj, kiuj kutime povis renkontiĝi nur en kongresoj.

## Letero-propono

Karaj amikinoj, fratinoj, sinjaŭlinoj<sup>\*</sup>, sinjorinoj kaj kamaradinoj, karaj ĉiuj.

Certe ankaŭ al vi okazis "post la festo" eksplodo de ideoj kaj proponoj, kiujn vi ne prezentis en iu privata aŭ publika societo, kvankam vi partoprenis ĝin kaj havis eblecon paroli. Nu, ĝuste tion mi nun spertas, post nia ne sufiĉe vigla publika kunveno pri virina agado en Lucerno, kie ekzistis abundo da eblecoj paroli pri siaj ideoj, sed kie mi silentis. Kaj nun, semajnojn post la kongresfermo, ideoj zumas en mia kapo kvazaŭ abeloj.

Laŭ mia opinio, la plej malbona vojo montri sin egala al viroj estas imiti iliajn mankojn: fumegi, blasfemi, diboĉi, amori senbride. Plej loge estas pravi sukceson en iu agadkampo kie viroj malsukcesis. Jen en tiu kampo kuŝas mia propono. Antaŭ kelkaj jaroj ekzistis konstanta kongresa programero "Oratoraj konkursoj" por gejunuloj, sed preskaŭ ĉiam konkursantoj estis viroj. Fine pro tro malmultaj kandidatoj la konkursoj estingiĝis. Ĉu ne estus plaĉe partopreni al "Virina oratora konkurso" en kadro de virinaj dumkongresaj kunvenoj? Virinoj plej ofte gvidas kursojn, sekretariumas en societoj, estas karavangvidantoj: ĉiuj situacioj postulantaj kapablon bele paroli, esprimadi siajn pensojn kulture kaj estetike. Oratorado apartenas al la plej malfacilaj disciplinoj de la intelekta agado, foje floranta kaj estiminda lerto, nun preskaŭ komplete neglektita, precipe en landoj kie ne ekzistas plurpartia politika sistemo. Tie politikistoj eĉ legi la tekston ne scias.

Ĉu ne estas plaĉe montri ke virinoj kapablas regi tiun klasikan kaj malfacilan parolmajstraĵon? Establi konkurson, aŭdi 10- ĝis 15-minutajn paroladojn de kandidatinoj senkonsidere al la aĝo, premii la plej bonajn; tion prizorgu la enlanda virina komitato.

Mi mem certas, ke ĉiam mi estus inter vizitantoj de tiaj konkursoj. Ĉu ankaŭ vi? Nu, kial ne fari almenaŭ provaranĝon jam en Stokholmo.

Emilija Lapenna, Jugoslavio

<sup>\*</sup>Sinjaŭlino: vorto el Ĉu vi kuiras ĉine? de Johán Valano. Ĝi signifas samtempe "sinjorino" kaj "fraŭlino", kiel la angla Ms. (= Mrs. + Miss). Uzante ĝin, virino ne bezonas sciigi sian edzinan staton.

### ISU en Stokholmo

En la kadro de la 65a Universala Kongreso en 1980 okazos la 33a sesio de Internacia Somera Universitato. Universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al la Komisiono pri ISU, kies sekretario estas prof. Bruce A. Sherwood, 507 S. Draper, Champaign, IL 61820, Usono. La proponoj (kun resumo de la prelego, mallongaj biografio kaj bibliografio - originalo kaj tri kopioj; kaj foto de la proponanto) atingu la sekretarion antaŭ la 31a de decembro, 1979. La kongresa temo en Stokholmo estas diskriminacio. Oni povas proponi prelegon ne koncernen al la kongresa temo.

Ĝus aperis disketo kun du kantoj, "Sven kaj Siv" kaj "Vivu la stel' ". Tiu lasta estas sufiĉe - pli ol sufiĉe, miaguste - konata, ŝimverda kanzono, sed "Sven kaj Siv" estas tute nova, verkita de la kantisto, Reine Svensson, originale en la sveda lingvo. La kanto rakontas tipan tagon de tipa laboranta virino en Svedujo (kaj ne nur tie), kie edzino laboras eksterhejme same kiel la edzo, sed tamen retenas pli-malpli plene la dommastrumanjn devojn: "Nur eblas al virino elteni tian vivon". La traduko havas kelkajn stilajn kaj ritmajn manketojn, sed la kantado kaj fona muzikado estas aĵnivelaĵ. Salutinda iniciato de Martha Andréasson kaj Esperanto-Klubo Kungälv!

La disko estas havebla de la eldoninto, Esperanto-Disko AB, 2265, S-425 90 Hisings Kärra, Svedujo (12,50 svedaj kronoj - en Svedujo 15,00 kr. - plus sendokostoj), kaj de la libroservo de UEA (8,40 gld. plus sendokostoj).

cp

## VIRINA AGADO EN LA ESPERANTO-MOVADO

Mi skizos al vi iom nian situacion en Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Dum la 3a Kongreso de ĈEA estis elektita nova estraro (Ĝia Centra Komitato, kaj Centra Kontrola kaj Revizia Komisiono). Unu kvinono de la nove elektita Centra Komitato estas virinoj, kaj en Centra Kontrola kaj Revizia Komisiono 60% (tri el kvin) estas virinoj. Estintaj estraranoj de ĈEA zorge preparis elektojn laŭ proponoj de unuopaj kluboj. Estis jam konate, ke la virinoj pli vigle kaj pli ofere plezumis siajn funkciojn. Tamen, multe da virinoj estas okupataj kaj zorgas pri siaj familianoj. Sed ne ĉiam regis bona harmonio inter viroj kaj virinoj. Antaŭ kelkaj jardekoj ekzistis eĉ luktoj - ne nur en Esperanto. Sed virinoj konvinkis virojn pri sia kapableco, agademo - ĉio dependas ĉiam de virinoj mem.

Do, ankaŭ agado de nia Virina Komisiono ŝanĝiĝis. Nun ni verbas virinojn en la Esperanto-movadon, ni instigas la virinojn, ke ili eduku siajn infanojn en Esperanto-medio kaj -spirito, por ke ili fariĝu ankaŭ esperantistoj, por kunlaboro kun Mondpaca Esperantista Movado, ĉar sen paco oni ne povas disvastigi Esperanton.

Maria Turková, Ĉeĥoslovakio  
Prezidanto de Virinaj Komisionoj de  
ĈEA kaj de MEM



En nia distrikto ekzistas nuntempe 4 Esperanto-grupoj. (Verŝajne ekde oktobro estos 6!) Ni fondis asocion, nomitan Esperanto-Junularo de la Distrikto Vechta. La plej multaj membroj estas junulinoj en la aĝo de 14 ĝis 25 jaroj.

Sed tio ne signifas, ke ĉe ni la virinoj estas memstaraj. Unue venis kelkaj knaboj kaj kelkaj knabinoj. La knaboj foriris - mi ne scias la kaŭzon, verŝajne ĉar ekzistas jam multaj grupoj por knaboj, do, ili tute ne restis -, la knabinoj daŭrigis kaj instigis siajn amikinojn ankaŭ lerni Esperanton.

Kvankam ni havas "nur" knabinojn en niaj grupoj (kaj kelkajn knabojn), la interna kaj ekstera grupvivo funkcias tre bone. La grupoj renkontiĝas semajne, ĉiuj grupoj de la asocio renkontiĝas monate kaj la delegitoj kunsidas kvaronjare. Ni aranĝas interŝanĝojn kun eksterlandaj grupoj (Ĝis nun kun Groningen, Nederlando, kaj renkontiĝo kun alia granda germana grupo en Hanovero). Estas planata ankaŭ vizito ĉe teatra grupo en Pollando. Ĉiujare en Lohne aŭ Ĉirkauŝo estas internacia renkontiĝo. Ĉi-jare ni aranĝis tendaron.

Sed mi opinias, ke la junulinoj ĉe ni ne farus tiel multe, se ĉeestus viroj, "kiuj ja povus fari la laboron pli bone". (Neniu diris tion ĝis nun, sed certe preskaŭ ĉiuj pensas tion.) Ekzemple ni faris vojo-montrilojn el ligno, segis kaj pentris ilin. Mi estas certa, ke la junulinoj ne segus, se junuloj ĉeestus. Verŝajne oni dirus, ke tio ja estas "vira laboro".

Tio estas laŭ mi la plej granda problemo. Se mi vidas virinojn - junajn kaj ne junajn -, kiuj devas fari tute simplan laboron (skribi leteron al iu oficejo, pagi fakturon, telefoni al mekanikisto ktp. ktp.), ili atendas ĝis la edzo revenas kaj faras ĝin, "ĉar li ja pli bone kapablas skribi, diri al la mekanikisto, kial la lavmaŝino (!) ne funkcias ...". Kaj la viroj ege ĝojas, ke ili povas helpi al tiuj senhelpaj virinoj. Min ege interesus scii, kion aliaj virinoj opinias pri tiu problemo, tial mi kun vera intereso jam atendas la novaĵleteron.

Mi laboras ĉe banko. Kaj mi vidas la virinojn, kiuj venas por preni monon kaj diri al ni, kiom ni devas ĝiri por iu fakturo. Sed tio estas preskaŭ ĉio, kion ili faras en la banko. Se estas demandoj pri rentoj, konstrusparkontraktoj a.s., ĉiam venas la viroj. Tion mi vidas ne nur ĉe ni en la banko, sed ĉie kaj ĉiam. Ankaŭ tre ofte en la Esperantomovado. Se esperantisto edziĝas, la edzino tre ofte komencas lerni Esperanton kaj venas kun li al la renkontiĝoj. Sed se esperantistino edziniĝas, ŝi tre ofte jam antaŭ la geedziĝo finas kun ĉio, kion ŝi ĝis tiam faris en la grupo. (Ankaŭ por tio mi havas multajn ekzemplojn, sed verŝajne vi jam mem konstatis, ĉu ne?)

Marianne Böckmann, FRG

Verŝajne ne plu ekzistas demando, ĉu entute virinoj rajtas labori ekster la hejmo. En pluraj landoj tio ja fariĝis ekonomia kaj socia fakto. Sed kiel la sekvantaj leteroj memorigas, tiu situacio ne ekestis facile; en Eŭropo ĝi rezultis nur el du militoj. Eĉ nun, en periodo de senlaboreco en multaj landoj, ofte releviĝas la demando pri la rajto de edzinoj ricevi laboron, kiu povus iri al nedungita viro. En Koreujo, la situacio de laboranta virino estas eĉ malpli sekura.

Ĉu la patrino de junaj infanoj laboru ekster la hejmo? Aŭ ĉu ŝi prefere dediĉu sin al sia familio? Du el la sekvantaj leteroj atentigas, ke ofte estas oportune ne eniri la labormerkaton, kaj por la individuo, kaj por la tuta socio. Ideo ne menciita en la leteroj estas la jena: ke patroj dediĉu pli da tempo al prizorgo de siaj infanoj, kaj pli egale dividu la taskon kun siaj edzinoj. Sendu viajn reagojn al tiu sugesto al SkE.

## **Egaleco ĉe la laboro**

Mi laboras(is) en kampo, kie ĉefe aktivis viroj. Tio validas same por mia profesia laboro kiel por la Esperanto-movado. Dum pli ol 40 jaroj mi deĵoris preskaŭ nur kune kun viroj (escepte de dujara estrado de skribĉambro, kie laboris inter 12 kaj 20 knabinoj). Mi povas diri, ke mi ŝatis labori kun viroj. Ili estis realistaj, objektivaj, afablaj, kamaradecaj, helpemaj. Ĉar mi laboris ĉefe en sociala tereno, oni ŝatis miajn iniciativon, objektivcon, fakan prijuĝon kaj mian komprenemon pri iliaj problemoj. Ili traktis min kiel koleginon!

Samrajteco en la unua periodo ne ludis rolon. Tion da virinoj ankoraŭ ne laboris en la fervoja medio - estis nur kelkaj esceptoj. (Pri la intermilita tempo mi ne parolu.) Post la milito la situacio ŝanĝiĝis. Ju pli da virinoj aperis sur la labormerkato, des pli da problemoj ekestis. Natura afero! Multaj virinoj ne laboris libervole, sed devige. Necesis ne nur solvi iliajn familiajn problemojn, sed alkitimigi ilin al ĝis tiam tute fremdaj okupoj kaj kuraĝigi ilin eluzi siajn talentojn. La virinoj rapide adaptiĝis, evoluis, montris kvalitojn kaj kuraĝon. Multaj viroj tion ne atendis kaj eĉ ne volis kredi tion. Ankaŭ por ili, ĝi estis nova situacio. Se virino montris ambiciojn aŭ eĉ intencis avanci, la viroj rigardis ŝin kiel danĝeron. - La samrajteco fariĝis aktuala! Mi observis kaj spertis ĵaluzon, envion, malamon, kalumniojn. Amuzaj, ofte ridindaj, situacioj kontribuis al reciproka kompreno aŭ malhelpis ĝin. Kvankam dum la lastaj jaroj la afero multe progresis, oni postulas ankaŭ hodiaŭ de virinoj 150% da kapabloj, diplomatan talenton kaj multe da sento en la fingropintoj. Laŭ miaj spertoj la harmonia etoso grandparte dependas de la virinoj (kaj tion ni konsciu).

Elfriede Kruse, FRG

Dum jam multjara vivo, mi havis la okazon alfronti la plej dramajn situaciojn inkluzive de du mondmilitoj. Tiuj ĉi, kiuj momente eliris multnombrajn virojn el la civila vivo, vole nevole, devigis multegajn inojn anstataŭi la forirantojn en familiaj, kiel en profesiaj, fakoj. Ofte ili devis roli en estraj rondoj, eĉ se malbone, kaj tute sen preparo por tiuj novaj, abrupte ricevitaj, taskoj.

Plej ĝenerale, la virinoj elmontris kuraĝon, saĝecon, efikecon. Tiuj estis epokoj kiam neniu elvokis seks-malsimilecon en laborkapabloj, kaj, sekve, la virinoj ricevis nenian kompleksion pri seksa malsupereco.

Kial do - Ĉefe kiam okazas enlandaj ekonomiaj krizoj, pro kiuj mankas laborproponoj, sekve familiaj enspezoj malaltiĝas en multaj kazoj - oni plej volonte akuzas virinojn, ke ili prenas taskojn kaj salajrojn, kiuj plej nature - laŭdire - devus iri al viroj?

Reale, ne ĉiuj viroj, ne ĉiuj inoj similas. En ambaŭ kampoj estas kleraj, laboremaj, dediĉitaj homoj flanke de tiuj malpli bone dotitaj de la naturo. Kial do, persisteme, enkonduki seksbatalemon?

Laŭ mi, en iu ajn fako, la virinoj devas serene, plej kuraĝe, akcepti ĉion pri kio ili sentas sin kapablaj, kaj kion ili deziras. La viroj juĝos laŭ la rezultoj kaj, kredis min, la plej seriozaj rekonas meritatan samegalecon diversfakan. Nekontesteble, restas ankoraŭ multe por fari. Cetere, rest-as/-os virinoj, esence inaj, kiuj ŝatas viran protektadon kaj aliaj, kiuj havas grandegan emon al nura patrineco, tute sen deflankiĝo. Ankaŭ ili rajtas tion opinii kaj deziri! Kial juĝi ilin kompatindaj subulinoj?

Ĉefe, ĉiu devas fidi al si mem, libervole elekti vivmanieron kaj provi trovi kontentigan homsorton.

B. Cheverry, Francujo

En mia lando, ne gravas diversaj problemoj krom unu, kiu estas seksa diskriminacio en profesioj, mi opinias. Kompreneble, virinoj ankaŭ laboras kun viroj en ĉiu kampo, kaj en speciala kampo egalas virinoj kaj viroj.

Sed la problemoj ankoraŭ restas en multaj kompanioj, kvankam en registaraj postenoj la situacio pliboniĝis. Frecipe kiam oficistino edziniĝas, tiam ŝi devas ekŝiĝi. Tial estas malfacile, ke virino akiru gravan rolon en la kompanio, kaj tial virino ricevas pli malaltan salajron ol viro en same aŭ aĉ malpli grava posteno.

Gim Ĝem-ok, Koreujo

La ne-plena egaleco de virinoj estas plej konvena al mi hodiaŭ. Ĉu vi min komprenas? Mi volas diri, ke pro la fakto ke mi havas du etulojn, kiujn unufanke mi volus varti mem, kaj aliflanke mi ŝatas ne esti troe ligata al la hejmo - mia situacio estas tre bona, ĉar, havante bonan helpantaron, mi povas iomete studi, iomete labori, kaj iomete esti kun la infanoj. Mia edzo ne povus tion fari!

Sed - eble foje mi ŝanĝos mian opinion. Nuntempe - mi ne povas batali por plena egaleco.

Anat Zajdman, Israelo

Kompreneble mi konsentas, ke virino havu la rajton labori ekster la hejmo, se ŝi tion deziras, kaj la plejmulto de britaj virinoj nun tion faras. Sed mi konstatas, ke tio kaŭzas problemojn precipe por la volontulaj movadoj kiel ekz. la Esperantaj organizoj. Kiam mi estis knabino, la edzinoj pli ofte restis hejme, kaj kiam la infanoj jam plenkreskis, ili havis iom da tempo por fari nepagatan laboron. Nun, se ambaŭ geedzoj laboras, vespere ili ambaŭ laboras en la domo kaj ĝardeno, kaj nek unu nek la alia havas multan tempon liberan por partopreni volontulajn agado-organizojn. Tiaj organizoj ofte devas dependi je la kunlaboro de la emeritoj - kiuj cetero vivas iom pli longe. Gvidanto de Junularo Esperantista Brita diris al mi lastatempe, ke ŝajne ĉefe junuloj kaj emeritoj laboras por Esperanto en Britio. La solvo de tiu problemo? - verŝajne ni devas atendi, ke la laborhoroj iompostiom malpliigos por doni pli da libera tempo.

Sybil V. Sly, Britujo

#### — VENIS TRI VIROJ —

el Afriko al la 64a Universala Kongreso en Lucerno, per financa helpo de la Adopta Kaso kaj Fondaĵo Azio-Afriko. Ĉu temas pri seksa diskriminacio? Almenaŭ ne rekte - ĉar nur viroj sin proponis. La financaj institucioj de la Esperanto-movado volonte helpus ankaŭ virinojn el mondpartoj, kiuj malofte reprezentigas ĉe Universalaj Kongresoj. Se vi estas en tiu kategorio, forte deziras veni al la 65a UK en Stokholmo kaj bezonas por tio financan helpon, skribu al Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, kun konciza priskribo de vi mem kaj de via Esperanto-agado.

## Honora sed ombra rolo

Manoŝi DaŝGupto



Juna hinda virino en la tradicia sario. Fotita de la aŭtoro.

En la okcidentaj landoj multe pli ol en Hindlando\* aperis movado en diversaj epokoj pri la libero de virinoj. Ja la fundamentaj rapide kaj ritmoj en la historio de Hindlando estas aliaj ol tiuj en la historio de Eŭropo kaj Ameriko.

Sekve ne havas sencen miri, ke ne okazis en Hindlando tio, kio okazis aŭ okazas en Eŭropo kaj Ameriko. Sed oni povas demandi tamen, je hinda perspektivo, kial aperis aparte mem-kontentaj kaj unuflankaj rimarkoj en la hinda kontribuo al la miloj da paŝoj, kiujn oni verkas dum la Internacia Virina Ĵaro proklamita de Unuiĝintaj Nacioj.

En Hindlando la virinaro, vidata kiel la patrinaro, ĝiam havis kaj havas ekstreme honoran rangon. La hinda tradicio atendas, ke la patrinaro solvos la kontraŭdirojn inter viroj kaj viroj kaj tiel disradios la bonecon tra la mondo; same kiel en hindua mito la patrino de la mondo intervenas en la milito inter la dioj kaj la titanoj, venkas la titanojn, kaj tuj poste redonas al la dioj iliajn proprajn militfortojn. Oni akceptas la fakton, ke ne ĉiu virino kapablas konforni al tiu tradicia rolo, ke la biologia patriniĝo ne donas al ĉiu virino dipatrinan grandiozon; oni diras, ke 'esti maskinta ne sufiĉas por patrini'. Malgraŭ tiuj modifoj la membildo de la hinduinoj glorie emfazas la majeston de la patrino rolo. Ili en diversaj manieroj volas demonstri kaj disdiri, ke ili apartenas al la majesto de sia tradicia rolo, kaj ke neniu

\* (Noto de la tradukinto: Mi uzas la formon Hinda Unio por la post-1947-a federacio kaj la formon Hindlando por la antaŭtiuĵara unuo, en kiu enestis la nunaj Hinda Unio, Pakistano kaj Bangladeŝo.)

ekstera takso rajtas bagateligi ilian valoron. La virino entenas tiun pli ampleksan energion, kiu la fortajn virojn translevos for de la konflikta sufero al la mondo de la bono, kaj kiu kreos bonradikan ligan inter la patra kaj la posta generacioj.

La fono de tia pensado ampleksas socian senton pri la sinsekvo de generacioj kaj filizofian koncepton de renaskiĝo. En la hinda hinduismo socio unu el la vivdevoj de la individuo estas geedziĝi. Plenkreska viro ne povas aŭ nur parte povas plenumi siajn ritajn devojn se li ne estas edzo. Nur se li generos idojn, li certigos al la spiritoj de siaj prapatroj la atingon de eterna ripozo. En la tradicio de socia penso, kiu ĉi tiel aranĝas la vivon kaj la postmortan mondon pere de kunligoj inter diversaj aĝoj, inter la seksoj, kaj inter la vivantoj kaj la mortintoj, oni plej forte konstatas inklino al la harmoniigo. La ĉefan respondecon por tiu harmoniigado portas la fidela edzino-patrino. En ĉi tiuj cirkonstancoj, se iu pretendas, ke la digno, kiun la virina movado volas enporti en la vivon de virinoj, estas malpli multa ol la honoro, kiun la hinda tradicio jam de longe donis al la virinoj, do oni devas kun iom da seriozo trakti tiun pretendon.

Ĉu la humiligo de virinoj estas nura fantazio en la hinda medio do? Ĉu la virinoj povas agi laŭplaĉe? Ne. Sed necesas atenti pri du aferoj.

(1) La ideon de laŭplaĉa agado la hinda tradicio taksas tre malalte. Estas nature, ke mondkoncepto bazita sur la kasta kaj karma sistemo<sup>\*</sup> konsideras la personan laŭplaĉan agadon kiel rifuzindan. Difinita homo ricevis vivkondiĉojn difinitajn de la aĝoj en antaŭaj vivoj, kaj tiu homo devas nun akcepti tiujn kondiĉojn kaj laŭ ili plenumi siajn devojn - jen la starpunkto de la hinda tradicio. Ĝuste tial oni ĉiam instruis kaj instruas en Hindlando, ke plej bone estas plenumi siajn personajn devojn laŭ sia religia kaj viva devaro, senkonsidere ĉu oni estas viro aŭ virino. Kiam homoj nove instruitaj pri okcidentaj doktrinoj komencis levi la personajn volon kaj malvolon super la socian regularon, de tiu tempo aperis alispecaj kompleksecoj en la vivo de viroj kaj virinoj. Oni povas eventuale alifoje diskuti la rolon de la okcidenta instigo en ĉi tiu evoluo. Nun sufiĉas diri, ke la komplekseco en la vivo de viroj kaj virinoj, kiujn vartis kaj kiujn instigas la koncepto de personaj plaĉo kaj malplaĉo, estas preskaŭ la sama en ĉiuj landoj de la aktuala mondo. Laŭ la malnova hinda pensmaniero, tio, ke la virinoj ne povas/ne rajtas agi laŭplaĉe, ne estas, ĉar ili estas

\*La kastosistemon kaj la teorion de karmo diversaj okcidentaj studentoj jam diskutis en diversaj lingvoj; oni povas supozi, ke multaj esperantistoj scias pri tiuj aspektoj de la hindua socio. Se leganto scivolos pri la ligo inter tiuj temoj kaj la nuna diskuto, simple necesas tion diri, kaj la nuna aŭtorino pretas daŭrigi pli detale pri tiu ligo, poste.

virinoj, sed ĉar neniu ajn povas/rajtas agi tiel. Ĉies naskiĝo kaj devaroj baziĝas sur lia aŭ ŝia merito laŭ agoj en antaŭaj naskiĝoj. Ĉiu devas plenumi siajn devojn: jen la ĉefa afero.

(2) En Hindlando la virino devas en edzina rolo ekzisti kiel la ombro de sia edzo. Ne ĉiu viro, kompreneble, atentis al sia ombro. Cetere, per taŭga manipulo de la lumoj, oni povas havi plurajn ombrojn de unu sama korpo. Do la humiligado de la virino kiel edzino, apud la ideo glorado de la virino kiel patrino, havas longan historion en la hinda socio. La poligamio fariĝis kontraŭleĝa baldaŭ post kiam la lando sendependiĝis en 1947. Oni faris leĝon kontraŭ infanaĝa geedzigo multe pli frue. Sed en la kamparo oni ankoraŭ vidas neplenkreskajn edzinojn. Ankaŭ ne maloftas edziĝo de viroj, kiuj ankoraŭ havas alian edzinon. Tiaj maldignoj havas interplektan ligan kun la ekonomia dependeco de la virinoj. Ja en la malriĉaj klasoj hindinoj jam de longe laboris apud kaj kune kun viroj. En la kampaj kaj aliaj arenoj de tiu laboro ili certe ne ricevis justan rekompencan por tiu laboro. Sed, estas bone memori, ke simila nejusta sistemo trafis kaj trafas ankaŭ la malriĉajn virojn. Interne de tiu ĝenerale ekspluatata geviraro la virinoj eble estis (kaj restas) iomete pli ekspluatataj. En ĉi tiu situacio ili sin ne sentis aparte ekspluatataj pro sia virineco. En la kunviva familisistemo tradicia, ankaŭ multaj dependaj viroj estis ĉiam simile subtenataj. La ideo, ke la viro ĝuste pro sia vireco devas respondeci pri sia sorto kaj vivgajni memstare, longe ne havis fortan radikon en la hinda socio.

Kiam, sub la kondiĉoj de tia socia pensado kaj kutimo de grandfamilia kunvivado, la mezepoka islama reĝimo establis sin en Hindlando, la altklasaj hinduaj familioj, konforme al la kutimoj de la islamaj aristokratoj kaj regaj familioj, akceptis la kutimon de vualado kaj de limigoj pri eksterhejma irado de virinoj kiel simbolon de prestiĝo. En ĉi tiu evoluo ludis rolon ankaŭ la timo, ke libera kontakto kun la nun islam-dominata<sup>2</sup> ekstera mondo minacos la hinduecon de la virinoj, kiuj, kiel patrinoj kaj kiel altklasanoj, havas apartan respondecon pri la pluerto de la hindua sociordo. Tamen, en iuj regionoj de la okcidenta kaj la suda Hindlando, for de la islama potencocentro Delhio, la libera senvuala moviĝado de virinoj escepte restis netuŝita. Se la ideo, ke la virinoj devas resti la ombroj de viroj, ne estus pli forta en la tiama Hindlando ol la ideo de la gloreco de patrinoj, do jam en tiu epoko la virinoj povus lanĉi protestan movadon. Sed tio ne okazis. Kiel iama nove eveninta islama reĝimo per sia kultura influo aperigis la vualan kaj hejme-restan kutimon, tiel ankaŭ la influo de la posta, brita reĝimo alportis movadon kontraŭ tiu kutimo. Tiuj altkastaj, kleraj hinduaj viroj, kiuj iniciatis la forigon de la vualkutimo, ĉerpis sian tiurilatan interesiĝon el la modelo de la senbara socia vivo de la aktuale reganta fremda nacio.

<sup>2</sup>Neologismo. Domini = superregi.

Ĉar la edzoj tion volis, aŭ ĉar aliaj familigvidaj viroj tion volis, la edzinoj kaj filinoj de prestiĝaj familioj en la dek-naŭa jarcento okaze aperis en publikaj lokoj. La plioftiĝo de tiaj okazoj portis la virinaron de la fino de la dek-naŭa jarcento en la dudekan. Lernejoj por virinoj aperis. Oni komencis tre arde konstati, ke la vera hinda kutimo postulas zorgan edukadon de virinoj. La mesaĝo, ke la virino estas la Unua Principo, ke 'se la hindinoj restos sen leviĝo, mankos al la naŭ' efektiviĝo', estis disdirata laŭte kaj publike. Ĉi tiun 'principan' rolon donis al la virinoj la hinda nacia movado.

En la dudeka jarcento la hinda nacia movado sukcesis impliki la hindinojn en la publikan laboron sen perdo de prestiĝo. Ĉi tiu movado estis kolektiva emancipiĝemo de virinoj kaj viroj. La sekvanta politika sendependiĝo kreis kadron, en kiu virinoj kaj viroj simile aliras al la privilegioj. Altkastaj virinoj zorge edukitaj kaj vartitaj en la glata vivo de la riĉa klaso facile okupas sociajn kaj politikajn prestiĝpostenojn. Ĉi tiuj sinjorinoj ĝuantaj la tradician patringloran prestiĝon tendencas forgesi la ordinaraĵajn virinojn, kiuj en familioj malriĉaj kaj pro malprivelegio ekspluatataj okupas lokon eĉ pli malprivilegian, kaj kiuj en sia mizera vivo de tempo al tempo aŭdas la fantaziadojn, ke en Hinda Unio la virinoj estas altrangaj. Se tiuj ordinaraĵaj hindinoj estus havintaj okazon enmeti siajn vortojn en la verkaron de la Internacia Virina Jaro, tio eble iom liberigus la hindan kontribuon el la unuflankeco.

La politike engaĝitaj partioj formis siajn virinajn sekciojn jam dum la nacia movado. Krome estis la virinaj socialaj laborfakoj de la religiaj organizaĵoj. Tiuj aferoj ekzistas plu, sed estas dubinde, ĉu oni rajtas nomi iliajn agadojn 'virina movado'. Ekster tio ekzistas en la lando iuj specife virinaj organizaĵoj, kiuj helpas al ordinaraĵaj virinoj en senhelpa situacio. Ili plej okupiĝas pri prostituitinoj, kiujn ili reakceptigas en la socion kaj trejnas pri sekuraj vivtenmanieroj. Estas malfacile plenumi tiujn respondecojn, kaj la organizaĵoj estas nesufiĉe fortaj. Kvankam la hinda juro agnoskas la rajton de virinoj al proprieta heredo, al egala rekompenco por egala laboro, kaj al ekposediniĝo je neceso, tamen pri la aplikigo de tiuj rajtoj neniu virina organizaĵo aktive okupiĝas. La kredo, ke la hinda socio ja donis kaj donas al la virinoj plej altan rangon, eble malfaciligas klaran apogadon al la postulo pri tiaj apartaj rajtoj.

Tradukis: Probal Daŝgupto




# Pensoj pri komunikado

Judith Junger-Kurpershoek

Kiuj el vi ne aŭdis iun rimarkon aŭ ŝercon pri la parolemo de virinoj? Virinoj estas ĉiam klasifitaj kiel babilemaj klaĉulinoj, akompanataj de kompatindaj viroj kiuj ne havas ŝancon eĉ malfermi la buŝon. Sed ĉu tiu bildo estas vera? Interesan, kaj parte tre originalan, vidpunkton pri la

temo de virinoj kaj parolado mi trovis en la libro Sex Differences in Human Communication (Seksaj diferencoj en homa komunikado)\*.



Ni ĉiuj scias, ke konversacio konsistas ne nur el la parolataj vortoj (enhavo) sed ankaŭ el aliaj elementoj: laŭteco, gestado ktp., kiuj kune formas la agon de komunikado. Ni ĉiuj scias ankaŭ, ke fakte tiuj subtilaj elementoj estas tre gravaj. Ekzemple, se vi havas infanojn (aŭ okupiĝis/as pri infanoj), vi scias kiom gravas la neparola kontakto kun beboj kaj etuloj: ridado, tuŝado, la patrina vizaĝo, voĉsono, parolmaniero (trankvila aŭ nervoza). Post la infaneco, oni daŭre reagas al tiuj subtilaĵoj de la komunikado, eĉ nekonscie. Kaj eĉ

pli, ĉar tiuj neparolataj signaloj multobligas kaj fariĝas pli rafinitaj. Mi volas prezenti kelkajn, kiujn mi trovis en la ĵus menciita libro.

Jen do kelkaj rimarkoj pri la ĝenerale nekonscie observataj aspektoj de pervorta komunikado, rilate al kaj parolmaniero kaj enhavo, kaj al mal-

\*Eakins & Eakins, Sex Differences in Human Communication, Houghton Mifflin Co. (1978). (La libro ne ekzistas en Esperanta traduko).

similecoj inter viroj kaj virinoj.

- (1) Afblaĵoj: esprimoj kun funkcio nur socia, ekz. "bonan matenon", "kiel vi fartas?", "en ordo", "ĝis".
- (2) Parolvico: parolaĵo de unu el la parolantoj. Ĝi klare finiĝas, kiam la parolanto silentas, eble ankaŭ indikinte per sia intonacio, ke la parolaĵo estas finita. Poste okazas tre mallonga paŭzo, komprenata de la aŭskultantoj, kaj sekvota de la komenco de nova parolvico.
- (3) Reago-signaloj: mallongaj sonoj kiel "hm", "jes", "mhm", "ho" ktp. Ili signifas, ke la parolanto daŭrigu, ke oni aŭskultas kaj komprenas; do, ke oni aktive aŭskultas. (Tamen ni ĉiuj certe memoras iun tedan kaj longan paroladon, dum kiu ni aŭtomate tiamaniere reagis, tute sen aŭskulti.) Ĝenerale la reago-signaloj celas: "Mi aktive komprenas vin, daŭrigu."
- (4) Interrompo: kiam la aŭskultanto komencas paroli, ne ricevinte signon, ke jama parolanto intencas fini. La aŭskultanto do fakte insiste silentigas la parolanton. Ekzemple:

A: Mi vidis hieraŭ televidan programon (pri) ...

B: La nederlandaj televidaj  
programoj estas ...

B klare interrompas A.

La aŭtoroj diskutas rezultojn de esploroj pri tiuj aspektoj de konversacio. Tiuj rezultoj montras, ke ja ekzistas diferencoj inter virinoj kaj viroj rilate al parolmaniero. Interrompoj en unuseksaj grupoj okazis same ofte, ĉu tiuj grupoj konsistis tute el viroj aŭ tute el virinoj. En ambaŭseksaj grupoj, tamen, 96% el la interrompoj faris la viraj partoprenantoj. Aliflanke, virinoj donis meze pli da reago-signaloj ol viroj, kaj fakte la rolo de subtenanto kaj helpanto estas konsiderata tipe virina.

En konversacio, ankaŭ la silento gravas. Ĝi estas la ĉeso en la fluo de diskutado. Oni atendas, ke ĝi okazus je la fino de parolvico, kaj do ke ĝi okazus egale ofte ĉe ambaŭ partoprenantoj en konversacio inter du homoj. Sed esploroj montris, ke ĉe ambaŭseksaj paroj la virinoj silentiĝas multe pli ofte ol la viroj, kaj ke 62% el iliaj silentoj okazas post (1) manko de minimumaj subtenaj reago-signaloj kiel "mhm", "ho" de la vira aŭskultanto; (2) interrompoj de la vira aŭskultanto. Tio fakte montras, ke dum interparolo la viroj malpli subtenis la virinojn ol inverse. Eĉ se ili faris tion ne tute konscie, ĝi tamen emis redukti la memfidon de la virinoj. Indas noti ankaŭ objektivan malhelpon al virinoj. Unu el la eblaj (kaj uzataj) reagoj al interrompiĝo estas simple daŭre paroli kaj fini la frazon. Sed pro la biologia fakto, ke viro simple havas kutime pli malaltan kaj fortan voĉon, virino des malpli facile sukcesas batali kontraŭ lia voĉo. Fakte viroj foje konscie uzas tiun taktikon kontraŭ virinoj. Eblas diri do, ke kiam temas pri tiu subtala forma aspekto de komunikado, ekzistas malsimileco inter la du seksoj. Virinoj pli subtenas la kunparolanton (ili malpli interrompas kaj pli aktive aŭskultas).

Aliflanke viroj prenas pli da parolvicoj, emas pli ofte interrompi aŭ paroli samtempe. Do, konsiderante ke interrompoj malrespektas la parolrajton de la alia partoprenanto kaj kion tiu volas diri, la aŭtoroj

opinias, ke la priskribitaj rezultoj montras, ke viroj sentas sin, kiam ili parolas kun virinoj, en alia situacio ol kun viroj, kaj ke tio fakte montras seksisman sintanon, eble nekonscian, sed tamen influan.

La temo de alia esploro estis, ĉu ekzistas rilato inter la socia rango de la parolanto kaj la ofteco, laŭ kiu oni interrompas sin/lin. La aŭtoroj surbendigis serion de universitato-fakaj kunsidoj. Jen la rezultoj:

a. Viroj pronis meze pli da aktivaj parolviceoj ol virinoj - alivorte, parolis pli.

b. Viroj interrompis pli ol virinoj.

c. La virino, kiu plej ofte interrompis, kutime interrompis aliajn virinojn.

ĉ. Viroj estis ĝenerale malpli ofte interrompataj ol virinoj.

d. Rango por kaj viroj kaj virinoj estis tre grava. Partoprenantoj emis ne interrompi siajn superulojn en la hierarkio. La plej ofte interrompata estis virino, kiu hazarde estis la sola ĉeestanto sen doktoreco, kaj la plej malofte interrompata estis la prezidanto.

Kompreneble, tio estas aparta situacio. Ĉu oni povas tiri el ĝi pli ĝeneralan konkludon kaj aserti, ke viroj kutime interrompas virinojn pli ofte ol virojn, ĉar virinoj havas malpli altan socian rangon kaj do estas malpli respektendaj? Tiaj rektaj konkludoj el statistiko pri psikologiaj tendencoj estas danĝeraj, sed ŝajnas al mi, ke la aŭtoroj prave konsideras, ke iliaj rezultoj montras simptomojn de fundamenta seksa mallegeco.

Seksaj malsimilecoj troviĝas ankaŭ en la esprimmaniero. Viroj emas paroli pli rekte kaj pli laŭcele\*. Krome, ili estas pli ofte ol virinoj

la demandantoj, en kiu rolo ili decidis la temojn de la konversacio kaj superregas ĝin.

Alia aspekto de la komunikado pritraktita en la libro estas la temoj de diskutoj. Ĉu vere ekzistas tipe virinaj aŭ tipe viraj temoj, kaj se jes - kio ili estas? En miksitaj grupoj, kiu enkondukas novajn temojn; kiu procento estas pli tipe vira/virina; kiuj estas la tipaj temoj, pri kiuj viroj emas paroli al virinoj kaj virinoj al viroj? En tiu ĉi mallonga prezento de la libro mi ne volas pli detale tion priskribi. Tamen, mallonge, ja ekzistas tipaj temoj: por viroj, politiko kaj sporto; por virinoj, personoj. Viroj pli emas paroli al virinoj pri tipe viraj temoj (do, konsiderataj malpli interesaj por virinoj) ol inverse.

\*Pri la granda kaj klara diferenco inter la esprimmanieroj kaj vorttrezoroj de virinoj kaj viroj estas alia interesa anglalingva artikolo: Robin Lakoff, "Language and Woman's Place" en Language in Society, vol. 2, n-ro 1 (1973).

Ankaŭ pluraj aliaj temoj estas pritraktitaj en la libro, inter ili: "virina lingvo", kiu kontrastas al tiu de viroj pro esprimmaniero, ĝentilaj formoj, vorttrezoro, akjektivoj; kaj neparolataj diferencoj - okulkontakto inter la diskutantoj, gestado, vizaĝesprimoj ktp.

Sed la verkistoj ne kontentiĝas pri nura prezento de esploroj kaj tiuj rezultoj, klarigo de fenomenoj el nova vidpunkto, kaj priskribo de subtilaj interpersonaj influoj. Ili ankaŭ celas aktivigi la legantojn, por ke tiuj mem konscie analizu la situacion ĉirkaŭ si. Jen do kelkaj praktikaj sugestoj. Estus interese, se vi mem provus ilin en via ĉiutaga rondo.

### (1) Interrompado

En konversacio aŭ diskuto:

- a. Kiu interrompas kiun?
- b. Kiu interrompas plej ofte?
- c. Kiu estas plej ofte interrompata?
- ĉ. Kiamaniere sekso ludas rolon en interrompado?
- d. Kiun rilaton vi trovas inter socia rango aŭ potenco, kaj interrompado?

Por pli klare kaj facile resumi la rezultojn, vi povas ilin aranĝi laŭ la jena tabelo:

Parolanto	Sekso	Aĝo	Rango kaj/aŭ profesio	Interrompis x fojojn	Estis interrompita x fojojn
1					
2					
3					
4					
5					

### (2) Temoj

Aŭskultu atente kelkajn konversaciojn, laŭeble inter parolantoj de kaj la sama sekso kaj malsamaj.

- a. Kiuj temoj estis plej popularaj?
- b. Pri kiuj temoj parolis la tute virinaj kaj tute viraj grupoj?
- c. Pri kiuj temoj parolis la miksitaj grupoj?
- ĉ. Kiu enkondukis novajn temojn? Kiu ŝanĝis la temojn?
- d. Ĉu la tradiciaj stereotipoj (laŭ kiuj virinoj diskutas ĉefe receptojn, vestaĵojn kaj onidirojn, dum viroj diskutas ĉefe politikon, aŭtojn kaj sporton) estas ankoraŭ validaj?
- e. Kiel aĝo, okupiĝo kaj eduko influis la elekton de temoj?

Ĉu vi venos al neatenditaj konkludoj, aŭ ĉu vi simple konfirmos viajn antaŭajn supozojn, sciigu la novaĵleteron pri viaj rezultoj.

## ENKETO PRI VIVO KIEL VIRINO

Ni estas la eldonantoj de la japan-lingva versio de Sekso kaj Egaleco, la Esperanta bulteno, kiun Anna Brennan redaktas. Ni eldonas en la japana lingvo por prezenti la enhavon al ne-esperantistoj en Japanio. Nun ni planas novan projekton -- enketo pri virino kaj laboro -- kunlabore kun unu el la plej grandaj ĵurnal-kompanioj en Japanio, kaj petas vian bonkoran helpon. Ni estas tre dankemaj, se vi bonvolus sendi al ni viajn respondojn.

Mainiti, la plej malnova tutlanda ĵurnalo en Japanio (eldonkvanto: 4.5 milionoj), intervjuis nin pri la japan-lingva SkE kaj raportis pri nia agado antaŭ ĉirkaŭ unu jaro. La sama ĵurnalo lastatempe kontaktis nin kaj proponis kunlaboron. Ili planas eldoni 8-paĝan suplementon pri virinoj en laboro en septembro ĉi-jare. La suplemento traktos la temon el diversaj aspektoj kaj enhavos sekcion pri virinoj en aliaj landoj. Ili deziras havi rektajn voĉojn de ordinaraj virinoj, sed ne formalajn anoncojn de registaroj aŭ raportojn de profesiaj ĵurnalistoj. Ili pensis, ke Esperantista komunikado povos multon fari por ĉi tiu celo, kaj ili proponis, ke ni, la eldonantoj de la japan-lingva SkE, kunlaboru por kolekti voĉojn de virinoj tutmonde pere de Esperanto. Ni decidis akcepti la proponon, kaj kune preparis enketilon.

Do ni petas vin, Esperantistan virinon, ĉu laboranta aŭ ne, sendi al ni viajn respondojn al la demandoj en la enketilo. Tajpu aŭ skribu preslitere la respondojn en kiaj ajn formo kaj longeco kaj sur kiaj ajn paperfolioj laŭ via bontrovo. Se eble, sendu ankaŭ nigra-blankan foton de vi. Se vi dezirus resti anonima en la ĵurnalo, indiku tion en via respondilo. Ni ne aperigos vian nomon.

Ni ŝatus ricevi viajn respondojn kiel eble plej baldaŭ (nepre antaŭ la 15a de aŭgusto, plej malfrue). Sendu viajn respondojn aerpoŝte. La ĵurnal-kompanio poste repagos al vi la afrankon per internacia respond-kupono.

Bonvolu sciigi viajn Esperantistajn konatinojn pri nia projekto, tiel ke pli multaj virinoj partoprenu.

Ni intencas publikigi la rezulton de la enketo ankaŭ en la Esperanta SkE poste, ĉar ĝi estos interesa ankaŭ al Esperantistoj.

Ni kredas, ke se ni sukcesos kolekti el vi informplenajn respondojn, ni povos montri al granda nombro da japanoj, kiuj legos la ĵurnal-artikolon, kiel utila kaj praktika estas nia lingvo.

Ni esperas, ke vi komprenos nian intencon kaj respondos al nia enketo. Ni elkore antaŭdankas vin.

Sincere viaj,

Poŝtadreso:  
HUKUNAGA Makiko  
Midori-so 2-1,  
Kamisyakuzii 1-739,  
Nerima-ku, Tokyo  
177 Japanio

福永 牧子  
HUKUNAGA Makiko,

山川 節子  
YAMAKAWA Setuko

- I. 1. Kio estas via nomo (kun prononco en Esperanto), aĝo, kaj adreso?
2. Kio estas via laboro, kaj kiom longe vi laboras?
3. Ĉu vi estas edziniĝinta, kunloĝanta kun viro, needziniĝinta, eksedziniĝinta, aŭ vidvino?
4. Kiom da gefiloj vi havas?
5. Kun kiuj vi loĝas en la sama domo?

## II. Pri Laboro

1. Ĉu vi pensas, ke ekzistas "viraj laboroj" kaj "virinaj laboroj" en via lando? Se jes, donu ekzemplojn.
2. Ĉu vi pensas, ke en via lando ekzistas seksa diskriminacio kontraŭ virinoj, kiam ili provas dungigi? Se jes, kia ĝi estas? Kaj ĉu vi mem spertis ĝin?
3. Kian seksan diskriminacion vi spertis/as en via laborejo? (ekz. pri salajro, elekto de labor-speco, promocio, deviga emertig-aĝo, mensa premo, k.t.p.)
4. Se vi laboris/as eksterhejme, ĉu vi havis/as ian malfacilaĵon, kiu nebligis/malhelpas al vi daŭre labori? Se jes, kio ĝi estas? (ekz. dommastrado, bebnasko, malbona laborkondiĉo, k.t.p.)
5. Ĉu vi sentis/as ĝojon en via laboro? Se jes, pro kia kaŭzo?
6. Ĉu vi laboras eksterhejme nuntempe? Se ne, kial ne? Kaj ĉu vi volas labori eksterhejme en estonteco? Se jes/ne, kial?

## III. Pri Edziniĝo kaj Hejmo

1. Kian viron vi elektis/os kiel vian edzon (aŭ kunvivanton)?
2. Se vi havas/is edzon (aŭ kunvivanton), ĉu vi iam sentis malkontenton aŭ malesperon pri via vivo kun li? Se jes, en kia kazo? Ĉu vi sentis/as vin feliĉa pri via vivo kun li? Se jes, pro kia kaŭzo?
3. Kiel vi dividas hejmajn taskojn kun via edzo (aŭ kunvivanto)? Kiel hejmaj taskoj estas dividitaj inter geedzoj ĝenerale en via lando?
4. Ĉu vi pensas, ke ekzistas seksa diskriminacio en via propra hejmo, aŭ ĝenerale en ordinaraĵ hejmoj en via lando? Se jes, kia ĝi estas?

## IV. Pri Prizorgo de Infanoj

1. Laŭ kiaj kriterioj vi decidis/os, ĉu vi nasku aŭ ne nasku infanojn?
2. Kiuj aŭ kiaj instancoj prizorgis/as infanojn en via propra hejmo, kaj ĝenerale en ordinaraĵ hejmoj en via lando?
3. Ĉu via registaro aŭ via laborejo donas al vi/virinoj sufiĉe bonajn laborkondiĉojn, subvenciojn kaj instituciojn por prizorgo de infanoj, por ke edzo kaj edzino ambaŭ povu daŭre labori?

4. Ĉu vi/oni ĝenerale traktas viajn/siajn gefilojn diference laŭ sekso? (eks. pri manĝaĵo, edukado, disciplino, hejmaj taskoj, k.t.p.)

#### V. Pri Vivo en Maljuneco

1. Kiel vi akiras/os viv-rimedojn(enspeŝon) en maljuna aĝo, post kiam vi ĉesis/os labori?
2. Ĉu vi vivas/os kun la familio de via filo aŭ filino? Kun kiu vi loĝas/os?
3. Kiu prizorgas/os vin kiam vi malsaniĝas/os?
4. Kiel vi volas pasigi tempon? (eks. ĝui hobion, okupiĝi pri socia movado, labori kiel volontulo, k.t.p.)

#### VI. Pri Aliaj

1. Ĉu vi pensas, ke via registaro klopodas altigi virinan rangon en la socio? Kian efikon ĝi sukcese plenumis ĝis nun en tiu rilato?
2. Kion vi atendas de la registaro por plibonigo de la stato de virinoj?
3. Kun kiu vi konsultas pri viaj malfacilaĵoj en via vivo kaj laboro? (eks. edzo, amikino, terepiisto, k.t.p.)
4. Ĉu vi partoprenas en ia aktiveco? Se jes, kio ĝi estas? (eks. hobia, studa, sporta, politika, volontula, k.t.p.)
5. Kiel rigardas seksan diskriminacion viroj ĉirkaŭ vi? (eks. via edzo, kunvivanto, kolegoj, amikoj, k.t.p.)
6. Por konservi pacon, kion, laŭ via opinio, civitanoj, specife virinoj, devas fari?
7. Kio estis/os la menuo de vespermanĝo en via hejmo hodiaŭ?
8. Kiom vi pagas por kosmetiko ĉiu-monate?
9. Kion vi plej volas akiri nuntempe?
10. Skribu ĉion ajn, kion vi volas diri pri virinoj en la mondo.

- \* Ni eble respondos viajn demandojn pri japanaj virinoj. Skribu demandojn se vi havas.

Multajn dankojn.